



*Estrara Komunikado:
EKO 2016-39 sendita el
Bunda, Tanzanio, la
27an de decembro.*

AMO 29 pluiris kaj jam venis al la fino

La unua seminaria tago pri Aktivula Maturigo venis al fino per vigla sesio gvidita de Jérémie Sabiyumva pri la stato kaj planoj de la junulara agado en Afriko, kie TEJO ja havas sekciojn kaj aktivulojn.

Denove kvardeko da seminarianoj ariĝis por la dua seminaria tago. La unua programero estis prezento de la laboro de la Afrika Komisiono flanke de ĝia kunordiganto, Adjevi Adje. Sekvis diskuta tasko plenumita en tri grupoj kun grandfoliaj notado de punktoj kaj rereportado. Post paŭzo la kolektivo plonĝis denove en la mondon de la verboj en Esperanto, precipe pri la ĝusta uzo de la gravaj sufiksoj –iĝ- kaj –ig-. Fermis la matenon grupa diskutado rilate al la antaŭtage prezentita Jaro de la Lernanto. La diskutantoj, denove en tri grupoj, traktis la kontinuon laŭ kiuj novaj esperantistoj naskiĝas: unue, konvinka informado, due (nia temaro), kiel efike instrui la lingvon kaj sproni la parolkapablon, kaj trie, kiel reteni kontakton kun kursfinintoj kaj persvadi ilin partopreni en la E-komunumo.

El la unua grupo aŭdeblis la trafa konstato: ‘Esperanto amikigas nin’. Plia diro: Esperanto donas al ni esperon; kiu havas esperojn, ŝatos Esperanton. Do, temis pri la idealisma flanko de la lingvo. Menciitis plie la faciligo pri vojaĝado – do la praktikaj aspektoj. Je tiu punkto eksplodis vigla debato: “Ĉu esperanto ŝparas al ni tempon?” la proponinto respondis, ke jes, ĉar oni ne devas lerni seson da lingvoj por havi kontakton kun seso da alinacianoj. La kontraŭuloj opiniis, ke ne, se oni apenaŭ povas praktike uzi la lingvon. Plie ne, se homoj jam havas alternativan solvon por transnacia komunikado.

Responde al la demando kiel sproni frue la parolkapablon, ĝemelurbaj rilatoj valoras, se tiuj postulas paroladon en Esperanto. Same la okazigo de E-lingvaj aranĝoj. Pri la utiligo de la lingvo, eblas praktiki kaj eluzi ĝin per la reto. Plia instigo povos esti ekzamenoj kun premioj por la plej bonaj sukcesintoj.

Ferma kunsido havis la pezan taskon pesi la du tagojn da diskutoj kaj pretigi rekomendojn, laŭeble kun indiko, kiu aŭ kiuj devas agi por realigi ilin.

Vortoj 350

Rekomendoj de la 29a AMO

Akceptitaj post diskutoj en du kunsidoj en la 26a kaj 27a de decembro 2016.

1. La Afrika Komisiono kaj UEA (AK) celu realigi unu AMO-seminaron ĉiujare.
2. Afrikaj landoj kun movado sed sen konsilanto nomumu tiun.
3. UEA esploru la eblojn, ke TEJO kaj la LA en Tanzanio kunlaboru por krei svahillingvan version de la eksterrilata informilo havebla en multaj lingvoj.
4. UEA esploru la eblon kaj indon eldoni kompletigitan version de la svahillingva lernilo de Nino Vessella aŭ prizorgi la aperigon de nova lernolibro.
5. Lokaj kaj regionaj grupoj kaj landaj asocioj raportu pli regule pri siaj agadoj kaj atingoj, al la Afrika Komisiono kaj E-revuoj tra la mondo.
6. UEA kaj la organizantoj de KER-ekzamenoj esploru eblojn por ekzamena sesio en Afriko.
7. ILEI intensigu la okazigon de ekzamenoj UEA/ILEI en Afriko por atesti lingvan kapablon kaj krome iel atesti la instrukapablon de afrikanoj.
8. En la instruado de Eo, oni pli forte emfazu la rolon de verboj kaj ĉiam prezentu ilin al lernantoj en adekvata maniero kaj kunteksto.
9. UEA kaj la Afrika Komisiono esploru eblojn starigi instituton aŭ similan projekton, kiu permesas al afrikaj esperantistoj praktike uzi la lingvon por plustudi.




La kongresejo meze kaj la manĝejo maldekstre.



Unu el la multaj diskutgrupoj – interago de ideoj.




Azio kaj Afriko kune debatas.



Esperanto – ankaŭ familia fenomeno

AFRIKA MOZAIKO



La rokmonto malantaŭa la kongresejo, kie abundas birdoj, simioj kaj libera bestaro.

Fotoj: SMG



Bone ĉeestata kaj inda afrika AMO-seminario. Multo el la programo konsistis el grupaj diskutoj



Diskutoj kaj planoj pri la junulara agado – la debatoj daŭras en la korto post la formala kunsido.



FINO DE LA MOZAIKO pri AMO 29 kaj la 6a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA